

Enhavo

1	Pasintaj aranĝoj	2
1.1	Kadre de la 92-a Universala Kongreso de Esperanto en Jokohama.....	2
1.1.1	La 5-a Nitobe-simpozio (István Ertl)	2
1.1.2	30-a Esperantologia Konferenco en Jokohamo (Ulrich Lins)	3
1.1.3	Internacia Kongresa Universitato	4
1.2	25-a kolokvo pri funkcia lingvistiko.....	4
1.3	Publika disputo pri eŭropa lingvo-politiko	5
1.4	Eŭropa konferenco pri interkultura dialogo (Zlatko Tišljar)	5
1.5	Tagoj de la lingvo	
1.5.1	En Biberach.....	6
1.5.2	En Rostock.....	7
2	Venontaj aranĝoj	7
2.1	Lingvistika konferenco en Lesja Ukrainka	7
2.2	Malĉeesta konferenco en Uljanovsk.....	8
2.3	31-a Esperantologia Konferenco en Roterdamo	8
3	Bibliotekoj kaj bibliografioj.....	8
3.1	Kolokvo pri planlingvaj bibliotekoj en Vieno (Detlev Blanke)	8
3.2	La 17-a konferenco de GIL pri planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj	10
3.3.	Esperanto-tradukoj de Ŝekspiro en usona biblioteko (Humphrey Tonkin)	12
3.4	Aperis la bibliografio de MLA por 2006 (Humphrey Tonkin)	13
4	Interlingvistiko kaj Esperanto en Universitatoj	14
4.1.	Doktoriĝo pri Esperanto de Wim Jansen	14
4.1.1	La doktoriĝo	14
4.1.2	Resumo de la disertacio.....	14
4.1.3	Konciza biografio	19
4.1.4	Ĉefaj publikigaĵoj	20
4.2	Magistriĝo en Łodz	22
4.3	En Poznań: Interlingvistika sesio kaj instruista trejnado (Ilona Koutny).....	22
5	Bibliografio de publikaĵoj de Klaus Schubert – elekto	22
5.1	Libroj	22
5.2	Eldonado/redaktado de libroj.....	23
5.3	Eldonado de revuoj (membro de la redakto-komitatoj)	23
5.4.	Studoj/artikoloj	23
5.5	Recenzoj.....	26
5.6	Malgrandaj recenzoj	27
6	Korektoj pri Bratanov.....	28

1 Pasintaj aranĝoj

1.1 Kadre de la 92-a Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo

En la kadro de 92-a Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo/Japanio (4.-11.8.2007), respektive antaŭ ĝi, okazis kelkaj aranĝoj de interlingvistika intereso:

1.1.1 La 5-a Nitobe-simpozio

Tuj antaŭ la inaŭguro de la 92-a Universala kongreso en Jokohamo, en la Eŭropa Instituto de la Universitato Sophia en Tokio okazis la kvina Nitobe-simpozio (2.-3.8.07). La ĉeftemo de la ĉi-jara Nitobe-simpozio estis „Eŭropaj lingvoj kaj aziaj nacioj, pasinteco, politiko, potencialo“.

La aranĝo realiĝis en la konferencjo de Universitato, kun panorama elvido super Tokion, kun porokaze muntitaj interpretbudoj por ĉiudirekta interpretado japana, angla, Esperanto, kaj parte eĉ en japanan signolingvon.

Organizis la simpozion [Centro de Esplorado kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo](#) kaj Eŭropa Instituto de [Universitato Sophia](#) en Tokio, kunorganizis Japana Esperanto-Instituto.

La partoprenantoj aŭdis prelegojn de japanaj sciencistoj de la Universitato Sofia kaj de aliaj altlernejoj, de lingvistoj alilandaj, inter ili kelkaj esperantistoj. Ĉiuj japanoj parolis japane, kaj trovis tion tre bonveniginda kaj nekutima por tiaspeca okazaĵo. La uzateco de la tri lingvoj - la japana, Esperanto kaj la angla - en la prelegoj distribuiĝis preskau egale.

La interpretado estis bonega, specife de la profesiula japana budo inter la japana kaj la angla, sed ankaŭ de la esperantista japana budo, kie deĵoris unu profesia interpretisto esperantista, kaj tri neprofesiaj: Kitagawa Hisashi, Usui Hiroyuki kaj Yamakawa Shuichi.

Dum la simpozio estis prezentitaj jenaj prelegoj:

Jean-Claude Hollerich: Eŭropa gramatiko en Azio

Humphrey Tonkin: La Nitobe-procedo en azia kunteksto

Masahiro Sato: La interponta ideo de Nitobe kaj helplingvo

Kimura Goro: Internaciaj lingvoj, fremdaj lingvoj kaj minoritataj lingvoj: interrilateco de lingvaj problemoj

Richard B. Baldauf: Sukceso kaj malsukceso en lingva planado por eŭropaj lingvoj en aziaj nacioj

Tove Skutnabb-Kangas: Lingvaj homaj rajtoj en edukado – tro malmulte, tro malfrue?

Hugo Cardoso: Kion signifas eŭropa? Defio de intenskontaktaj variaĵoj por lingva klasifiko

Sergej Anikejev: Rusa kulturo kaj japana socio

Zegimaa Choidon: Eŭropaj lingvoj kaj Mongolio

Atsushi Ichinose: Reviviĝo de la portugala en Azio

Izumi Kunihisa: La franca lingvo en la japana socio

Usui Hiroyuki: Esperanto por "venki Eŭropon": soci-evoluisma interpreto en Japanio

Marek Koscielni: La kultivado de fremdlingva edukado en la japana kultura kunteksto

Robert Phillipson: La nova lingvo-imperia ordo: lecionoj eŭropaj kun tutmonda signifo

Kawahara Toshiaki: Anglalingva edukado kaj lingvopolitiko en Eŭropo

Feng Zhiwei: La rolo de la angla lingvo en Ĉinio

Joseph Errington: Koloniismo, naciismo kaj la disvastiĝo de lingvoj de pli vasta komunikado

E. Annamalai: La angla en la lingvoekologio de Barato

Probal Dasgupta: La vivanteco de gepatraj lingvoj: uzi la tradukadon kiel kultivilon

Totok Suhardijanto: La indoneza inter aliaj lingvoj en Indonezio

Mark Fettes: Esperanto, ĉu azia lingvo?

(Laŭ raporto de István Ertl en Libera Folio, <http://www.liberafolio.org/2007/jokohamo7/>)

1.1.2 30-a Esperantologia Konferenco en Jokohamo

Dum la 92-a Universala Kongreso en Jokohamo komence de aŭgusto 2007 okazis la 30-a Esperantologia Konferenco. La celo de esperantologia konferenco daŭre estas doni al fakuloj la okazon prezenti kaj diskutigi la rezulton aŭ aktualan staton de siaj studoj pri diversaj aspektoj de la lingvo Esperanto kaj de la lingvo-komunumo de la esperantistoj. Samtempe la konferenco celas ankaŭ konsciigi la kongresan publikon pri la graveco de esperantologia esplorado. La ĉi-jara konferenco havis la temon „Aziaj kontribuoj al esperantologio“. Ĝi estis iusence daŭrigo de simil-tema konferenco, okazinta dum la 79-a UK en Seulo en 1994.

La prelegantoj kaj iliaj temoj estis:

Prof. D-ro Gotô Hitoshi, Tohoku-Universitato, Sendai: “La Esperanta leksikografio, precipe rilate al la Esperanto-Japana Vortaro”.

Ma Young-tae, Akademio de Esperanto / Dankuk-Universitato, Seulo: “Studo pri maldikigo de Esperantaj vortaroj”

Yamasaki Seikô, Akademio de Esperanto, Tokio: “Pri aglutineco”

D-ro Tida Syuntarô, Universitato de Fremdaj Studoj, Ôsaka: “Kial multas lokaj adpozicioj en Esperanto? Komparo kun la japana, Tok-pisino, Dom kaj aliaj lingvoj”

Huĝimoto Tacuo, Kioto: “Pri kaj ĉirkaŭ Ludovikito (Itô Kanzi, 1918-2005)”

Sibayama Zyun'iti, Jokohamo: “La Proverbaro de Zamenhof kaj orienta saĝo laŭ Matuba Kikunobu (1903-1989)”

Prof. D-ro Alicja Sakaguchi, Adam-Mickiewicz-Universitato, Poznań: “Esprimoj de realaĵoj en Esperanto: kontribuado por tradukistoj”

Oni konstatas la multecon de japanaj prelegantoj. Tio atestas interalie la altan kvaliton de esperantologiaj esploroj farataj en Japanio. Aliflanke pro financaj limoj ne eblis inviti ĉinajn fakulojn al Jokohamo.

La konferencon gvidis *d-ro Ulrich Lins*. Salutvortojn diris nome de CED *prof. Humphrey Tonkin*. Organizan helpon donis *s-ro Simizu Kōiti*.

Kiel jam pli frue, al la ĉeestantoj evidente plaĉis la kombino de malsamaj temoj, prezentitaj kadre de esperantologia konferenco. La tekstoj estos verŝajne publikigitaj de UEA.

(Laŭ informoj de *Ulrich Lins*)

1.1.3 Internacia Kongresa Universitato

Kadre de la 60-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU) oni prezentis 9 prelegojn, inter kiuj tri estis aparte interesaj laŭ interlingvistikaj aspektoj:

Amri WANDEL: IKU kaj Esperanto en scienco kaj tekniko
GOTOO, Hitosi: La vortaro por lernantoj
ZHU En: Esperanto kaj Bakin¹

(Wandel, Amri [2007, Red.]: IKU 60. Internacia Kongresa Universitato. 60-a sesio. Jokohamo, Japanio, 4.-11. aŭgusto 2007. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 121 p.)

1.2 25-a kolokvo pri funkcia lingvistiko

La adeptoj de la t.n. „funkcia lingvistiko“, lingvistika skolo, kiu estis influita aparte de la franca lingvisto André Martinet, de tempo al tempo okazigas siajn kolokvojn.

La 25-a Kolokvo okazis 4.-8. Aprilo 2001 en la germana urbo Frankfurt/Odro. Nur nun ni eksciis, ke en la aperintaj aktoj ankaŭ enestas kelkaj interlingvistike interesaj kontribuoj:

Weyd, Harald (éd.): Langue – Communauté – Signification. Approches en Linguistique Fonctionnelle. Actes du XXVème Colloque Internationale de Linguistique Fonctionnelle. Frankfurt/Main usw. Peter Lang, 400 S. (Sur p. 1 troviĝas eldiro en 13 lingvoj, inter ili ankaŭ en Esperanto):

José Carlos Herreras: Quelle(s) langue(s) pour l'Union Européene?
Maria Butan: Pluralité linguistique et/ou langue neutre
Jeanne Martinet²: Les langues internationales auxiliaires: le choix d'interlingua

¹ *Bakin*, ankaŭ *Ba Jin*, *Pa Chin*, *Ba Kin* (1904-2005), unu el la plej gravaj verkistoj de Ĉinio dum la 20-a jarcento, aktiva esperantisto. Li verkis multajn romanojn. Inter aliaj aperis „La Familio“ en la traduko de Laulum, Beijing.

² La vidvino de André Martinet, nun adepto de Interlingua.

1.3 Publika disputo pri eŭropa lingvo-politiko

Sub la moto „Lingva diverseco en Eŭropo: kulturaĵo aŭ lukso?“ la organizaĵo Europa Union Deutschland (Eŭropa Unio Germanio) la 22-an de Junio 2007 okazigis publikan disputon. Ĝi okazis en la konstruaĵo de la gazetara kaj informa fako de la federacia registaro de Germanio, Berlino.

Partoprenis ĝin *Privata Docento Dr. Dr. Rudolf Fischer* (prezidanto de Germana Esperanto-Asocio) *Jochen Richter* (vicĉefo de la kabineto de la komisaro pri multlingveco de Eŭropa Unio, *Leonard Orban*) kaj *Prof. Dr. Norbert Walter* (ĉefo de la esplorcentro de Deutsche Bank [Germana Banko] kaj ĉefa ekonomo la Deutsche-Bank-grupo).

La aranĝon malfermis *Peter Altmaier*, membro de la Germana Federacia Parlamento (Deutscher Bundestag) kaj prezidanto de Europa-Union Deutschland, same parlamenta ŝtata sekretario ĉe la federacia ministro por internaj aferoj). La temon enkondukis *Andreas Ulrich* (ĵurnalisto ĉe Radio Eins/rbb), kiu ankaŭ gvidis la tutan eventon.

1.4 Eŭropa konferenco pri interkultura dialogo

Eŭropa konferenco „Interkultura dialogo kaj komunikado“ kadre de la eŭropa projekto „Alieco kiel valoro“ okazis 2007-07-29-31 en Maribor, Slovenio, enkadre de la sepa kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio. Tiu-ĉi, kune kun sia partnero „Asocio por Eŭropa Konscio“ estis prezentinta la projekton al la Eŭropa Komisiono, kiu aprobis kaj kunfinancis ĝin. La projekto „Alieco kiel valoro“, kiu daŭros ĝis marto 2008, inkluzivis vizitojn de eksterlandaj konferencanoj al hejmoj de mariboranoj por sperti la vivkulturon de slovenoj kaj konfronti ĝin kun la sia. Antaŭvidataj estas raportaj artikoloj en naciaj gazetoj, montrantaj la rolon de Esperanto en interkulturaj rilatoj. La konferenco mem enhavis jenajn prelegojn:

EP-anino Margareta Handzlik: Interkultura dialogo kaj komunikado en Eŭropo

EP-anino Ljudmila Novak: La kono de lingvoj por pli bona komunikado

Mag. Vinko Ošlak: Kio estas la vera problemo de la etnaj minoritato?

D-ro Seán O’Riain: Esperanto por pliefikigi Eŭropan Union

Aleks Kadar: Al novspeca, 3-direkta lingvopolitiko: por regionaj, landaj kaj internacia lingvo

D-ro François Lo Jacomo: Ĉu internacia lingvo havu propran kulturon?

D-rino Věra Barandovská-Frank: Komunikado en fikciaj kulturoj

D-ro Vladimir Lariĉev: Interkultura dialogo kaj globaligo

D-ro Hans Michael Maitzen: La alpa regiono – eŭropa renkontejo de lingvoj kaj kulturoj

Mag. Zlatko Tišljar: Sub kiuj kulturoj interkultura dialogo eblas?

Cent partoprenintoj de la konferenco el 20 eŭropaj landoj konstatis baze de la prezentitaj referaĵoj kaj diskutoj, ke:

(1) la proklamo de la jaro de interkultura dialogo estas grava kontribuo al pli harmonia rilatado inter la homgrupoj en Eŭropo sendepende de naciaj, religiaj kaj rasaj diferencoj,

(2) Slovenio estas taŭga loko por demonstri la interkulturan dialogon, ĉar ĝia popolo vivas dum longa periodo en paca kunekzistado kun najbaroj apartenantaj al ĉiuj kvar grandaj lingvofamilioj de Eŭropo (romanida, slava, ĝermana kaj finnugra),

(3) necesas konsciigi per edukado eŭropajn civitanojn pri neceso evoluigi kaj plifortigi komunan eŭropan identecon harmonie kun la ekzistantaj naciaj kaj regionaj identecoj kaj tiel kontribui al la eŭropa integriĝo,

(4) la interkultura dialogo postulas la forigon de lingvaj baroj,

(5) por havi facilan komunikadon kaj lingvon kiu simbolus tuteŭropan identecon estas necese trovi neŭtralan lingvan solvon, kiu respektas samrajtecon kaj multlingvismon de ĉiuj civitanoj de Eŭropo,

(6) uzinte dum la konferenco tre sukcese la neŭtralan lingvon Esperanto, la partoprenantoj rekomendas al la Eŭropa Komisiono mendi sciencajn studojn pri ebleco apliki Esperanton por antaŭenigi la interkulturan dialogon inter diverslingvanoj en Eŭropa Unio.

Zlatko Tišljarić

(Aperis en „Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft/Humankybernetik“ [grkg], 48, 3/2007, p. 140).

1.5 Tagoj de la lingvo

La jaro 2007 estas „Jaro de la homaj sciencoj“. Je tiu okazo la „Deutsche Gesellschaft für Sprachwissenschaft“ (Germana asocio pri lingvistiko) subtenas aktivecojn, kiuj celas informi nefakan kaj eksteruniversitatan publikon pri lingvistiko.

1.5.1 En Biberach

Je la 12a de julio 07 okazis projekttago pri lingvoj en gimnazio en *Biberach an der Riß (Baden-Virtembergio)* kadre de tiu ĉi iniciativo.

La projekttago « Lingvo » koncernis la gelernantojn de la 6aj klasoj (dua gimnazia jaro). Ĉiu lernanto partoprenis en du el la jenaj projektoj: komputila lingvistiko, la ĉina, la franca, la rusa, la antikva greka, la germana lingvo de signoj (Deutsche Gebärdensprache, germana gestlingvo), la rumana kaj Esperanto. La projektojn gvidis kaj lokaj instruistoj kaj docentoj el diversaj universitatoj. La ĉefaj celoj estis unue, montri al la gelernantoj ke ili jam havas bonan lingvan konon por kompreni la strukturon de novaj lingvoj kaj due, vekti la intereson lerni pli pri novaj lingvoj kaj kulturoj.

Dum la Esperanto-projekto (gvidita de *d-ro Manfred Sailer*, Universitato Göttingen) la lernantoj ricevis bazan informon pri la strukturo, la historio kaj la kulturo de Esperanto. Plejparto de la partoprenantoj neniam antaŭe aŭdis pri Esperanto, sed ili montris grandan intereson kaj bone kapablis ligi la novajn informojn kun sia sperto kun fremdaj lingvoj. Tial eblis diskuti pri demandoj kiel “En kiu senco Esperanto estas ‘facila’?”, “Ĉu indas lerni Esperanton?” kaj “Kiel la Esperanta lingvokomunumo diferencas de aliaj lingvokomunumoj?”.

(Laŭ informo de *Martin Sailer*)

1.5.2 En Rostock

Sub gvido de *Dr. habil. Cornelia Mannewitz*, slavistino ĉe la Universitato Rostock (norda Germanio) kaj membro de la prezidio de Gesellschaft für Interlinguistik (GIL, Societo pri Interlingvistiko) en la menciita universitato okazis 24.10.07 „Tago de Lingvistiko“, kiu celis informi la publikon pri bazaj problemoj de lingvistiko.

Okazis 10 prelegoj kaj mallongaj prezentoj, inter ili tiu de *Detlev Blanke* sub la titolo „De skribotabla projekto al lingvo – kion vi jam ĉiam volis scii pri ‘mortnaskita’ lingvo kiu ‘vivas’ „. Oni ankaŭ prezentis afiŝan programeron pri la esprimiloj de Esperanto, preparitan de Privata Docento Dr. Sabine Fiedler de la Universitato Leipzig.

En la kadro de la populara „universitato por infanoj“ en Rostock D-rino Mannewitz dufoje prelegis pri la temo „Kiel eksterteranoj komunikus?“

Resumoj de la prelegoj aperis sub www.uni-rostock.de/tagderlinguistik .

La plena listo de la subtenitaj projektoj videblas sub <http://www.dgfs.de/remarks/d1/rm154.pdf>.

2 Venontaj aranĝoj

2.1 Lingvistika konferenco en Lesja Ukrainka

De 10-a ĝis 12-a de aprilo 2008 en la ukraina urbo Lesja Ukrainka okazos internacia scienca konferenco kun la titolo

Interagado de etnaj kaj planitaj lingvoj en la kunteksto de la eŭropa integriĝo

Invitas la Ministerio pri Klerigo kaj Scienco de Ukrainio, Volinia Nacia Universitato nome de Lesja Ukrainka, Filologia Fakultato, Fakultato pri Romana kaj Germana filologioj, Fakultato pri Eksterlandaj Rilatoj

La ĉefaj temoj de la konferenco:

- Uzado de etnaj lingvoj por internacia komunikado en Eŭropa Unio kaj la najbaraj landoj;
- Interago de la ukraina lingvo kaj internaciaj lingvoj;
- Planita(j) lingvo(j) kiel internacia(j) komunikilo(j);
- Ŝtata(j) lingvo(j) kaj oficiala(j) lingvo(j); dulingveco, plurlingveco;
- Prioritataj kaj minoritataj etnolingvoj;
- Gepatra lingvo en lernado kaj edukado;
- Lingvo kaj la etna kulturo, la beletro;
- La lingvaĵo de amaskomunikiloj;
- Literatura lingvo kaj sociaj, regionaj variantoj;
- Aktualaj problemoj de la tradukado;
- Atingoj de la eŭropa leksikografio;
- Kompilado de lingvaj komputilaj datumbazoj.

Estas planita ronda tablo pri “Etnaj stereotipoj en internacia kaj interpopola komunikado”.

Ĉiuj eŭropaj lingvoj kaj Esperanto estos uzataj kiel laborlingvoj.

La materialoj de la konferenco estos publikigitaj en la faka scienca revuo de Volinia Nacia Universitato “*Volinj filologia: teksto kaj kunteksto*” antaŭ la komenco de la konferenco.

phylological@univer.lutsk.ua (Daniljuk Nina, baltaj, slavaj lingvoj kaj Esperanto);

2.2 Malĉeesta konferenco en Uljanovsk

La Uljanovska Pedagogia Universitato anoncis malĉeestan sciencon konferencon pri la temo:

"Aktualaj problemoj de klerigado en Rusio kaj eksterlande: lingvistika, metodika, pedagogia aspektoj".

Fakte temas pri eldono de papera verkaro, kiujn oni bezonas por mencii en disertaĵoj ktp. Unu el 5 laboraj lingvoj estas Esperanto.

La temoj estas jenaj:

1. Problemoj de teoria kaj aplika lingvistiko.
2. Problemoj de teorio kaj metodiko de instruado de fremda lingvo.
3. Problemoj de klerigado en Rusio kaj landoj de studata lingvo.

Laborlingvoj estos la rusa, la angla, la germana, la franca kaj Esperanto.

Limdato: la 1-a de marto 2008.

Prezo: 100 rub. por paĝo (+ 50 rub. sendokosto).

Pliaj detaloj (ruslingve) troveblas en http://reu.ru/enhavo/konferenco_uljanovsk_2008.doc

Estas bona eblo montri nin en scienca universitata medio. Eblas sendi ion en Esperanto, kaj ankaŭ ion en la rusa pri Esperanto-instruado, ekzemple. Demandojn sendu al *Yurij Karcev*. yuka@yandex.ru (el E-rus-info].

2.3 31-a Esperantologia Konferenco en Roterdamo

En la kadro de la Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en la jaro 2008 en Roterdamo, kiel kutime en la programo troviĝos esperantologia konferenco. Lige al la „Jaro de la Lingvoj“, proklamita de UN kaj UNESCO, la konferenco traktos la ĉeftemon

„Esperanto kaj aliaj lingvoj – kontrastlingvistikaj kaj socilingvistikaj aspektoj“

Esperantologoj, pretaj kontribui al la temo, bv. kontakti la organizanton de la konferenco: Detlev Blanke (dblanke.gil@snafu.de).

Estas planate, eldoni la aktojn de la konferenco.

3 Bibliotekoj kaj bibliografioj

3.1 Kolokvo pri planlingva bibliotekoj en Vieno

En la komfortaj ejoj de la Palaco Mollard de la Aŭstria Nacia Biblioteko (Österreichische Nationalbibliothek, ÖN) en Vieno la 19-an kaj 20-an de oktobro 2007 okazis tre grava kolokvo sub la kadra temo „La tradicia biblioteko – defio kaj novaj teknologioj“. Partoprenis 30 personoj

el 8 landoj, inter ili la vicprezidantino de UEA *Claude Nourmont*, la ĝenerala sekretario de UEA, *Barbara Pietrzak*, kaj la ĝenerala direktoro de la Centra Oficejo de UEA, *Osmo Buller*. Jam tiuj nomoj montras, ke ankaŭ por UEA tio estis grava aranĝo.

La kolokvon preparis kaj gvidis *Herbert Mayer*, la direktoro de la Kolekto pri Planlingvoj kaj la Esperanto-Muzeo, kiu ankaŭ faris la enkondukan prelegon pri la gastiganta biblioteko.

La kolokvo do okazis en institucio, kiu laŭ vidpunktoj de amplekso kaj kvalito de la planlingva biblioteko, laŭ jura statuso (parto de gvida ŝtata biblioteko) kaj profesia gvidado estas sendube la ĉefa en tutmonda skalo. Ne nur konatas la ampleksega katalogo Trovanto³, sed lastatempe ankaŭ ekrealiĝadas kunlaboro kun „Bildarchiv Austria“. Jam pli ol 2000 fotoj el la historio de Esperanto estas skanitaj, videblaj kaj uzeblaj en la reto⁴.

Ankaŭ menciendas, ke la en ÖN nove fondita datumbanko HANNA (Handschriften, Autographen und Nachlassbestände, t.e. manskribaĵoj, aŭtografoj kaj postlasaĵoj) ankaŭ enhavos materialojn de gravaj esperantistoj kaj interlingvistoj kiel *Joseph R. Scherer* kaj *Eugen Wüster*. Progresas la ciferecigo de Esperanto-publicaĵoj antaŭ 1945. Ĝis nun estas skanitaj kaj videblaj en la retejo⁵ ĉiuj ĝis 1900 aperintaj Esperanto-materialoj. Oni krome skanas revuojn kaj alirebligas per la reto sondokumentojn. Kaj ne laste la Esperanto-Muzeo eldonadas originalan literaturon en Esperanto.

Superrigardon aparte pri la situacio kaj problemoj de planlingvaj arkivoj donis *Detlev Blanke* (Berlino).

La kunlaboranto de ÖN *Christian Cimpa* (Vieno) detale klarigis la elektronikan konservadon de fotoj, Ĝis fino de 2008 oni planas skani pli ol 10 000 fotojn el la entute 30 000. Esperantistoj kaj organizaĵoj ankaŭ rajtas sendi historie interesajn fotojn al Vieno. Ili devas havi laŭeble precizajn informojn. Ankaŭ granda parto el la 3 500 Esperanto-objektoj, kiuj prilumas la historion de la lingvo-komunumo de la planlingvo baldaŭ estos rigardeblaj en la reto.

Utho Maier kaj *Karl Heinz Schaeffer* (Aalen/Germanio), detale informis pri la stato kaj la perspektivoj de la Germana Esperanto-Biblioteko, kiu posedas ĉ. 21 000 registroj kaj pli ol 40 000 bibliografiajn unuojn (do inkluzive unuopajn dokumentojn). La materialo estas elektronike registrita je ĉirkaŭ 80%. La biblioteko en Aalen estas la plej granda publika interlingvistika fakbiblioteko en Germanio (www.espbib.de.nr).

Dr. Árpád Máthe (Budapest) anoncis por 2008 la aperigon de la plej granda bibliografio de planlingvaj periodaĵoj. La verko enhavos pli ol 12 000 periodaĵoj, inter ili ĉ. 90 % en aŭ pri Esperanto. Oni planas aperiĝi duan parton kun diversaj indeksoj kaj kompletigoj.

Reinhard Haupenthal (Malaucène/Francio) donis superrigardon pri Volapuko en bibliotekoj kaj arkivoj kaj prezentis proponojn pri la konservado kaj utiligo de la materialo.

Miroslav Malovec (Brno/Ĉeĥio), kiu aparte meritiĝis pri la Esperanto-kolektoj en Ĉeĥio, atentigis pri kelkaj bibliotekoj en la reto⁶ kaj pri kelkaj internaciaj projektoj lige al la starigo de enretaj

³ <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/eo/index.htm> (tie ‚Datumbanko Trovanto’).

⁴ <http://www.bildarchivaustria.at/default.aspx>

⁵ Vidu en Esperanto): <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/eo/index.htm>,

En la germana: <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm>

⁶ Vidu ekz.: <http://digital.library.upenn.edu/books/>

bibliotekoj⁷, kaj ke tie ne manku Esperanto. Ĉi-rilate menciindas la projekto Gutenberg⁸, kiu jam disponas pri kelkaj titoloj en Esperanto. Eŭropa Unio planas starigi grandegan retbibliotekon⁹.

Marek Blahuš (Brno/Ĉeĥio) studento de informadiko kaj komputa lingvistiko, ĝenerala sekretario de E@I¹⁰, priskribis sian projekton de superkatalogo de esperantaj titoloj.

La konata fondinto de la duonaŭtomata traduksistemo DLT (Distributed Language Translation), *Inĝ. Toon Witkam* (Utrecht/Nederlando), prezentis programaron, kiu ebligas korekti skanitajn Esperanto-tekstojn.

Ljubomir Trifončovskij (Varna/Bulgario), ĉefredaktoro de „Literatura Foiro“ kaj aktivisto de la bulgara Esperanto-movado informis pri la komplika situacio (aparte post 1989) de la kolektoj en Bulgario, aparte de klubaj bibliotekoj.

La multjara direktorino de la Esperanto-Redakcio de Pola Radio, *Barbara Pietrzak* (Varsovio) informis pri klopodoj ciferecigi kaj tiel konservi grandan parton de la riĉega sondokumentaro de la redakcio.

Kiel konate la disaŭdigoj estas ĉiutage aŭskulteblaj en la reto¹¹

ÖN kaj UEA subvenciis la kolokvon. UEA planas eldoni la aktojn.

Detlev Blanke

3.2 La 17-a konferenco de GIL pri planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj

Nelonge post la supre priskribita kolokvo okazis en Berlin (23.-25.11.2007) la 17-a konferenco de „Gesellschaft für Interlinguistik e.V.“ (GIL, Societo pri Interlingvistiko), kiu realigis sian laŭstatutan programon.

La konferencon partoprenis 40 personoj. Kadre de la jarkunveno de la membraro la estaro prezentis superrigardon pri la lastjare farita agado, el kiu evidentiĝis, ke GIL estas kompetenta organizaĵo pri interlingvistiko antaŭ ĉio pro la komptenteco de siaj membroj, kiuj multe publikigis pri fakaj temoj.

Kun kelkaj novaliĝoj en GIL nun membras 84 personoj, inter ili 16 universitataj profesoroj kaj 27 doktoroj. Kvankam GIL estas germana societo kaj la ĉefa lingvo estas la germana (do ne Esperanto), en ĝi ankaŭ membras interlingvistoj el eksterlando, nome el Aŭstrio, Ĉeĥio, Ĉinio, Estonio, Finnlando, Hungario, Irlando, Italio, Japanio, Kroatio, Luksemburgio, Nederlando, Pollando, Rusio, Svedio, Svisio.

Evidente ekzistas internacia bezono por tia organizaĵo.

GIL kvarfoje eldonas la bibliografie orientitan bultenon “Interlinguistische Informationen“ (IntI) kiu ĝis fino de 2007 aperis en 65 numeroj. Krom tio ĉiujare aperas la konferencaktoj kiel kromkajeroj (Beihefte) de IntI, en 2007 la 14-a volumo.

⁷ Vidu ekz.: <http://onlinebooks.library.upenn.edu/>

⁸ Vidu: <http://www.gutenberg.org/browse/languages/de>

⁹ Vidu: <http://europa.eu.int/eurlex/lex/LexUriServ/LexUriServ.do?uri=COM:2005:0465:FIN:DE:HTML>

¹⁰ Temas pri iniciato de junaj komputilistoj-esperantistoj. Ili i.a. eldonis la DVD „Esperanto elektronike“ <http://vikio.ikso.net/Projektoj/ElektronikaEsperantio/DVD>

¹¹ <http://www.polskieradio.pl/podcast/39/podcast.xml>

La membrokunveno per elekto konfirmis la ĝisnunan estraron

<i>Prezidanto</i>	Dr.sc. Detlev Blanke (Berlin)
<i>Vicprezidanto</i>	PD ¹² Dr. Sabine Fiedler (Leipzig)
<i>Trezoristo/kasisto</i>	Dipl.Inĝ. Horst Jasmann (Berlin)
<i>Membro</i>	Dr. habil. Cornelia Mannewitz (Rostock)
<i>Membro</i>	PD Dr. Dr. Rudolf Fischer (Nordwalde ĉe Münster)

Ligita al la jarkunveno de la membroj, kiel kutime, estas germanlingva faka programo, kiu ĉi-foje havis la ĉeftemon

„Planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj“

Okazis jenaj ses prelegoj:

<i>Detlev Blanke (Berlin)</i>	Planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj – ecoj kaj problemoj
<i>Herbert Mayer (Wien)</i>	Tradiciaj bibliotekoj – novaj defioj (la Kolekto Planlingvoj en la Aŭstria Nacia Biblioteko)
<i>Grit Ulrich (Berlin)</i>	Esperanto en la matetrialoj de la „Fondaĵo arkivo de partioj kaj amasorganizoj de GDR en la Federacia Arkivo de Germanio“
<i>Marek Blahuš (Brno/Ĉeĥio)</i>	Propono por kreo de superkatalogo kaj cifereca arkivo de la Esperanto-literaturo en la reto
<i>Fritz Wollenberg (Berlin)</i>	Planlingvoj en la Arkivo de la Berlin-Brandenburga Akademio de Sciencoj
<i>Bernhard Pabst (Berlin)</i>	La privata Esperanto-arkivo de Gustav Kühlmann (Kopenhago)

Oni krome prezentis jenajn prelegojn:

<i>Erich-Dieter Krause (Leipzig)</i>	Problemoj de esperanta leksikografio por la germana sub aparta konsidero de la grandaj vortaroj
<i>Rudolf-Josef Fischer (Nordwalde)</i>	La nomoj de la germanaj federaciaj landoj en Esperanto
<i>Sabine Fiedler (Leipzig)</i>	Interlingvistiko en universitatoj – spertoj el Leipzig
<i>Bengt-Arne Wickström (Berlin)</i>	Spertoj kun la seminario „Ekonomio kaj Lingvo“ en la Humboldt-Universitato Berlin
<i>Cornelia Mannewitz (Rostock)</i>	Lingvo kaj komunikado – spertoj lige al la G8-pinta konferenco en Heiligendamm (Germanio)

¹² PD = mallongigo por „Privatdozent“ (privata docento), iom stranga nomo por habilitaciinta sciencisto, kiuj havas la kvalifikon de universitata profesoro (i.a. rajtas prelegi) sed ankoraŭ ne estas alvokita al tiu posteno.

Menciindas la programero sabate vespere: *Wim Jansen* el Nederlando ne nur estas lingvisto/interlingvisto, sed ankaŭ inĝeniero pri aer- kaj spacveturado. Li laboris dum multaj jaroj por la Eŭropa Spacvetura Agentejo, inter alie en Moskvo. Li prezentis prelegon pri aspektoj de la senpezeco.

Johann Pachter ofertis librojn kaj *Sebastian Kirf* elektronike registris la tutan konferencon sur vidbendo. Kiel kutime la aktoj de la konferenco (volumo 15) aperos en la sekva jaro.

3.3 Esperanto-tradukoj de verkoj de Ŝekspiro en usona biblioteko

Dudek verkoj de *Ŝekspiro* ekzistas en Esperanto-traduko – kelkaj eĉ pli ol unufoje tradukitaj. Sed ĝis nun nur unu trovis lokon en la kolekto de la Ŝekspira Biblioteko Folger (*Folger Shakespeare Library*) en Vaŝintono, la plej granda biblioteko en la mondo dediĉita al la poeto kaj lia epoko.

Tiu situacio ŝanĝiĝis la 15-an de novembro, 2007, kiam delegacio de la Esperantika Fondaĵo (Esperantic Studies Foundation) prezentis al la biblioteko kompletan de la Ŝekspiraj tradukoj en Esperanto – entute 26 volumoj. La plej frua el tiuj 26 volumoj, *La Ventego*, datiĝis de 1905 kaj la plej lasta, la naŭa eldono de *Hamleto*, de 2006.

La Biblioteko jam posedas ekzempleron de pli frua eldono de *Hamleto*, tradukita de la kreinto de Esperanto, *d-ro L. L. Zamenhof*, fine de la 19-a jarcento. La Biblioteko estas ĉefe konata pro tio, ke, el 300 ekzistantaj ekzempleroj de la unua kompleta verkaro de Ŝekspiro (1623), la tielnomata First Folio, ĝi posedas pli ol 70 ekzemplerojn. Ĝi posedas multajn tradukojn de la granda poeto, sed nepre ne ĉiujn, kaj ĝi serĉas donacojn de mankantaj volumoj (vidu la katalogon ĉe <http://shakespeare.folger.edu/>).

“Temas pri valora aldono al nia kolekto. Malofte oni alportas 26 volumojn, el kiuj ni jam posedas eĉ ne unu,” rimarkis *Richard J. Kuhta*, ĉefbibliotekisto, kiu akceptis la donacon nome de la Biblioteko. Lin akompanis *Georgianna Ziegler*, Bibliotekisto de la Referenca Fako.

“Ni bezonis iom da tempo por trovi la kompletan kolekton,” komentis *Humphrey Tonkin*, de la Universitato de Hartford, dum la prezento nome de la Fondaĵo. “Kelkajn ni facile trovis, sed aliaj postulis iom da vera detektivado. Esperanto-libroj ofte aperas en marĝenaj lokoj ĉe malgrandaj eldonejoj, kaj trovi ilin postulas serĉadon.” Li esperas, ke la Fondaĵo sukcesos aldoni al la kolekto en la estonteco aliajn rilatajn materialojn, ekzemple koncerne prezentojn de Ŝekspiraj dramoj en Esperanto.

Nur kvar Ŝekspiraj teatraĵoj ricevis plenajn surscenigojn en Esperanto: *Hamleto* en Antverpeno en 1928, *La Komedio de Eraroj* en Bulgario en 1963, lastatempa prezento de *Reĝo Lear* en Vjetnamio, kaj (kiel la unua), *Kiel Plaĉas al Vi* en subĉiela prezento dum la Universala Kongreso de Esperanto en Vaŝintono mem en 1910.

Koncerne kvaliton, *Tonkin* klarigis, ke, kiel oni povus atendi, la kvalito de la tradukoj varias. Kelkaj estas iom amatoraj, sed aliaj estis faritaj de konataj Esperanto-verkistoj (kiel *William Auld*, *John Francis*, *Reto Rossetti* kaj *Kálmán Kalocsay*), ofte kun granda fideleco al la originalo kaj kun atento al prezentblo. *Tonkin* ja devus scii: li mem tradukis du dramojn, *Henriko Kvina* kaj *La Vintra Fabelo* – kaj li esperas iam spekti ilin sur scenejo.

Akompanis *Tonkin* *d-ro E. James Lieberman*, psikiatro kaj aŭtoro de biografio de la psikologo Otto Rank, kaj *d-ro David Gaines*, komponisto. Ambaŭ estas aktivaj esperantistoj. La unua simfonio de *Gaines* (1998), kiu aperis ĉe la diskoeldonejo MMC, portas la aldonan titolon “Esperanto.”

Humphrey Tonkin

Kontaktoj: tonkin@hartford.edu; ejl@gwu.edu; DaveGaines@aol.com

3.4 Aperis la bibliografio de MLA por la jaro 2006

Lastatempe aperis la kvinvoluma Internacia Bibliografio de Libroj kaj Artikoloj en la Modernaj Lingvoj kaj Literaturoj (*2006 MLA International Bibliography of Books and Articles in the Modern Languages and Literatures*), la jara bibliografio de la usona asocio pri modernaj lingvoj (Modern Language Association).

La bibliografio kovras la fakojn lingvistiko, literaturo kaj folkloro trans ĉefe la okcidentaj lingvoj, sed kun kreskantaj kontribuoj ankaŭ el aliaj mondopartoj. En la volumoj de 2006 aperas entute 66.884 eroj (kompare kun 67.465 en la antaŭa jaro).

La paperaj volumoj estas kompilitaj surbaze de la vasta elektronika datenobazo, kiu enhavas registrojn jam de kvindeko da jaroj, detale indeksitajn de 1980. Tiu datenobazo estas konsultebla en la grandaj esplorbibliotekoj en ĉiuj partoj de la mondo.

Kompilas la bibliografion profesia teamo de trideko da bibliografoj en Novjorko kaj teamo de 131 volontulaj bibliografoj el diversaj mondopartoj. Jam de multaj jaroj, Esperanto havas sian fortan lokon en la bibliografio dank' al la laboro de Esperanto-kunlaborantoj. Nuntempe tiuj kunlaborantoj estas *Detlev Blanke* kiel Bibliografo kaj *Humphrey Tonkin* kiel Ĉefbibliografo.

La subĉapitro pri Esperanto konsistas el ĝenerala sekcio plus sekcioj pri bibliografio, gramatiko, leksikologio (ankaŭ kun siaj subdividoj), morfologio, stilistiko, sintakso, tradukado kaj aliaj temoj.

Artikoloj kaj libroj pri literaturo en Esperanto normale aperas en la ĉapitroj, kiuj rilatas al la literaturaj produktoj de la koncerna lando. Tial *William Auld* aperas en la ĉapitro pri skota literaturo, *Kálmán Kalocsay* aperas en la ĉapitro pri hungara literaturo, kaj ĝeneralaj artikoloj pri Esperanto-literaturo foje aperas en la kvara volumo, pri ĝenerala literaturo. Sekve, malfacilas nombri la tutan sumon de eroj, kiuj iel rilatas al Esperanto. La indeksa volumo enhavas sub la kapvorto "Esperanto" proks. 100 erojn, kiuj sendas uzantojn al aliaj partoj de la bibliografio.

La celo estas listigi ĉiujn ĉefajn sciencajn librojn kaj artikolojn pri la lingvo kaj ĝia komunumo, kiuj aperis en la koncerna jaro. En la ĉapitro pri "Internaciaj Lingvoj," kie la plejparto de la eroj rilatas al Esperanto, aperas ĉi-foje entute 282 eroj (en 2005 temis pri 270).

Plej rimarkinde: el la centoj da lingvoj, en kiuj registritaj dokumentoj estis verkitaj, Esperanto okupas dekduan lokon (en 2005 ĝi okupis la dekan lokon). Pro la evidenta graveco de tiu ĉi parto de la laboro, *d-ro Tonkin* estis en 2005 nomita ano de la komitato de MLA, kiu respondecas pri la bibliografio. Li membras dum tri jaroj.

Ĉi-jare, *Humphrey Tonkin* aperigis ampleksan anglalingvan artikolon en la dua numero de 2007 de la revuo *Language Problems and Language Planning (LPLP)*, kiu, sub la titolo "Recent Studies in Esperanto and Interlinguistics" (Lastatempaj studoj pri Esperanto kaj interlingvistiko) donas superrigardon de la evoluo de Esperantologio kaj interlingvistiko en la jaro 2006, surbaze de la kompila laboro de li kaj *d-ro Blanke*.

Humphrey Tonkin

4 Interlingvistiko kaj Esperanto en Universitatoj

4.1 Doktorigo pri Esperanto de Wim Jansen

4.1.1 La doktorigo

Doktoriĝis en la Universitato de Amsterdamo la iama estrarano de Esperanto Nederland kaj de Internacia Esperanto-Instituto (IEI), *Wim Jansen*, docento pri interlingvistiko kaj Esperanto en tiu sama universitato. Por atingi tiun ĉi rezulton Jansen faris esploron pri vortordaj aspektoj troveblaj en la nuntempa, jurnalismeca lingvaĵo kaj publikigis pri tio disertacion, kiun li sukcese defendis la 2-an de oktobro. La doktrigaj akompanantoj estis la *profesoroj Hengeveld* (por la ĝenerallingvistika parto) kaj *Van Oostendorp* (por la ĝenerallingvistika kaj esperantologia aspektoj). En la doktriga komisiono sidis i.a. *prof. Haase* de la Universitato de Bamberg, Germanio.

La ceremonion ĉeestis pluraj konataj esperantistoj el Nederlando kaj ekstere. La 283-paĝa disertacio estas verkita en la nederlanda lingvo kaj proponas resumojn en la angla, Esperanta kaj germana lingvoj. Temas pri la dua disertacio pri Esperanton rilatanta temo defendita en nederlanda universitato ene de unu jaro (post *Marcus Sikosek*, doktriginta en novembro 2006 post esploro pri la historio de UEA), sed pri la unua disertacio post 1947(!)¹³, kiu rekte koncernas la lingvon mem.

Estas antaŭvideble, ke la Universitato de Amsterdamo baldaŭ nomumos Jansen plenrajta speciala profesoro en la katedro, kiun li de 2004 okupas en la nomo de IEI. La teksto de la disertacio estas libroforme acetebila ce IEI kontraŭ EUR 25,20. Informis *Atilio Orellana Rojas* iei001@tiscali.nl.

Jen la disertacio:

*Jansen, Wim*¹⁴ (2007): *Woordvolgorde in het Esperanto. Normen, taalgebruik en universalia. Amsterdam: Amsterdam Center for Language and Communication (ACLC); Netherlands Graduate School of Linguistics (Landelijke Onderzoekschool Taalwetenschap, LOT), 283 p.*

4.1.2 Resumo de la disertacio

La vortordo — kiun mi komprenas kiel la konscian ordigon de vortoj kaj vortgrupoj en pli ampleksajn signifoplenajn ŝablonojn — estas aspekto de la homa lingvo, kiu estis kaj estas esplorata en multaj ‘naturaj’ lingvoj.¹⁵ En la ĝenerala lingvistiko ĉefrolas demandoj pri la influo de certaj sintaksaj, semantikaj kaj pragmatikaj funkcioj sur la vortordon, kiun parolanto fine elektas en sia parol-ago. Ankaŭ la interago inter la vortordo kaj la (morfologia) fleksio, kaj tiu inter la vortordo kaj la intonacio, cele al la asigno de la dezirataj funkcioj al la diversaj frazopartoj, estas temoj centraj en vortordaj studoj. El la perspektivo de la kompara lingvistiko mi aludas ĉefe al demandoj pri la universaleco de certaj vortordaj teorioj kaj al la korelativeco inter vortordaj fenomenoj kaj aliaj propraĵoj de la homa lingvo. Se mi difinus naturan lingvon kiel “la

¹³ Temas pri : Manders, W.[ilhelmus] J.[ohannes] A.[rnoldus]. 1947. *Vijf kunsttalen. Vergelijkend onderzoek naar de waarde van het Volapük, Esperanto, Ido, Occidental en Novial*. Purmerend: Muusses, 386 pp. (DB)

¹⁴ La oficiala antaŭnomo, tiel en la disertacio, estas *Willem Hendrik*.

¹⁵ Por unuecigi la terminologion, en tiu ĉi studo estas uzata la termino ‘vortordo’ ankaŭ kiam la translokeblaj unuoj en frazo estas pli ampleksaj ol unuopaj vortoj kaj kovras vortgrupojn.

lingvon, kiun homa komunumo tradicie uzas por sia ĝenerala interkomunikiĝo kaj kiun infano, kreskanta en tiu komunumo, lernas denaske,” tiam Esperanto — ja la esplorobjekto de tiu ĉi studo — falus ekster la kategorion de la naturaj lingvoj.¹⁶ Mi intencas prirezoni ĉi-sube, ke ekzistas bonaj argumentoj por loki la ‘artefaritan’ lingvon Esperanto apud la naturajn lingvojn kiel indan objekton por esploroj pri vortordaj teorioj en la homa lingvo.

Esperanto estis kreita de unu persono, L.L. Zamenhof, kiu ĝin publikigis en 1887, preskaŭ tridek jarojn antaŭ la apero de la unua moderna lingvoteorio.¹⁷ Kvankam Zamenhof posedis solidan konon de deko da klasikaj kaj modernaj lingvoj, li ne estis lingvisto kaj kreis sian lingvon intuicie kaj empirie, profitante sian vastan praktikan lingvokonon kaj ne bazante sin sur iuj specifaj teoriaj elirpunktoj. Mi poste revenos al tiu ĉi aspekto, sed antaŭ tio mi donu al vi grandlinian skizon de la parolantaro aŭ lingvokomunumo de Esperanto.

Esperanto estas la artefarita lingvo aŭ planlingvo kun la plej longa seninterrompa historio de uzateco (de 1887 ĝis hodiaŭ). Krome, la Esperanto-lingvokomunumo manifestas sin kiel tutmonde disvastiĝinta parolantaro, kiu uzas la lingvon en tiom da aplikoj, kiom neniu alia planlingvo eĉ de malproksime iam atingis.¹⁸ Tiu ĉi parolantaro nombras multajn individuojn, por kiuj la komuna lingvo, Esperanto, kontentigas ĉiujn komunikadajn postulojn, kiujn ili povus imagi por ‘dua’ lingvo. Ne malofte ili spertas sentimentan ligitecon al la lingvo, kian oni atendus ĉe fieraj parolantoj de antikva, nacia kulturlingvo, pli ol ĉe parolantoj de planlingvo, kiu ne havas siajn radikojn en iu naciismo aŭ patriotismo. Tenante min je la formala distingo inter la artefariteco kaj natureco de lingvo laŭ la kriterio de ĝia deveno, mi povas nomi Esperanton ‘lingvo spertata kiel natura’, dank’ al la multeco de siaj aplikoj, la natura kaj afekcia traktado de la lingvo far ĝiaj parolantoj kaj ilia kreemo en la lingvo.

Ĉi-supra konciza karakterizo de la Esperanto-lingvokomunumo montras Esperanton kiel la solan planlingvon plene socian, elkreskintan el sia projektstadio. Ĝi ankaŭ pravigas etikedi la lingvon ‘funkcie natura’, kvankam nek la unua konkludo, nek la dua devas maski la specialan devenon de la lingvo, kio rekondukas min al la interrompita argumentado fine de la antaŭa alineo.¹⁹

Esperanto estis sintezita ĉefe el latinida kaj ĝermana fontoj kaj el kelkaj kontribuoj de alia deveno. Ĝian publikigon en 1887 akompanis konciza gramatiko kaj baza vortaro, kiun la uzanto povis pligrandigi memstare. Ekde tiam, kvar-kvin generacioj de uzantoj plu evoluigis la lingvon. Dume, la lingvo ne disfalis en malsamajn variaĵojn. Male, observante la hodiaŭan parolan kaj skriban normojn, oni emas konkludi, ke ĝi evoluis direkte al granda unuformeco. Tiu ĉi konkludo, fakte, estas laborhipotezo en la prezentata verko. Dekomence disponeblaj ‘reguloj’ ne multe helpis en tio. Kaj en la gramatiko de 1887 (Zamenhof 1968/1887) kaj en la deviga lingvofundamento de 1905 (Zamenhof 1963/1905) malabundas eksplicitaj reguloj. Tio validas antaŭ ĉio por la sintakso. Male, ekzemplaj tekstoj ĉeestas en relativa abundo. En la unua ampleksa nederlandlingva priskribo de Esperanto ni legas pri tio (Manders 1947: 334): “Devigaj preskriboj [WJ: por la konstruo de frazoj], do, mankas. Tamen, la verkantoj de prozo silente respektas iujn regulojn, kiuj estas interpreteblaj kiel normdonaj”. Manders ne profundigis en la temon kaj tial lia konstato restas nekontentiga, se ni volas klarigi la ekziston de vortordaj ŝablonoj, kies funkcioj montriĝas rekonataj tra la tutmonda Esperanto-parolantaro. Sekve, pli da

¹⁶ Por tiu difino de natura lingvo vidu Dik/Kooij (1981: 12), kiu dum la okdekaj jaroj estis baza enkonduka verko en la ĝeneralan lingvistikon en Nederlando.

¹⁷ Vidu De Saussure (1971/1915).

¹⁸ Por la sociaj atingoj de Esperanto vidu Blanke (2000).

¹⁹ Por historia superrigardo de planlingvoj vidu Duliĉenko (1989: 47-61). Krom kelkaj esceptoj, neniu el tiuj projektoj superis la stadion de manuskripto aŭ de limigita eksperimenta uzado.

esploroj estas necesaj kaj la antaŭe starigita demando — ekde nun limigita al la frazkonstruo — kial turni nin al Esperanto, aŭ ne deturni nin de Esperanto, por fari lingvistikajn esplorojn, estas respondebla jene. Okupiĝi pri Esperanto signifas okupiĝi pri lingvo, kiu estis intuicie kaj empirie konstruita sen devigaj reguloj por la vortordo, kaj signifas okupiĝi pri lingvokomunumo, kiu malhavas iun formalan aŭtoritaton, kiu estus rajtigita devige preskribi aŭ malpermesi tiun aŭ alian konstruon de frazo (krom se ĝi estus rekte kontraŭfundamenta). Okupiĝi pri Esperanto krome signifas okupiĝi pri lingvo kultivata de multaj siaj uzantoj kiel absolute natura instrumento por interkomunikiĝo kaj artisma kreemo, per kiu eblas senĝene esprimi sin sen ekspone sin al la risko de ‘korektado’ fare de denaskuloj.

En tiu kunteksto, voĵmontraj parolantoj kaj verkistoj kun dekoj da diversaj fonoj denasklingvaj dum 120 jaroj kontribuis al la establiĝo de vortordaj ŝablonoj, kiuj ludas rekoneblajn rolojn en la internacia interkomunikiĝo, sed kies detala funkciado restis neesplorita ĝis nun. Ĉu la projekto Esperanto, dum la skizita evoluo, organizis sin kiel natura lingvo kaj ĉu, do, indas uzi ĝin kiel provlingvon por esploroj ĝenerallingvistikaj?

En la studo prezentata ĉi tie mi faris kvantan kaj kvalitan esploron pri la vortordo en korpuso de modernaj, plejparte aferecaj tekstoj. La korpuso konsistas el lastatempaj ĵarkolektoj de la revuoj *Esperanto* kaj *Monato* kun suma amplekso de ĉ. 280.000 vortoj. El tiu korpuso, subkorpusoj de maksimume po 150.000 vortoj estis uzataj por la kvantaj esploroj.

Aldone, mi kondukis eksperimentan esploron, enketante tri grupojn de Esperanto-parolantoj pri vortordofenomenoj. Unu grupo konsistis el profesiaj uzantoj de Esperanto kaj estis komplete miksitaj laŭ denasklingvaj fonoj.

La dua grupo konsistis el denaskaj nederlandlingvanoj, la tria el denaskaj franclingvanoj. Entute 40 personoj estis enketitaj kaj ĉ. 4000 respondoj ellaboritaj. La rezultoj de la kvantaj analizoj de la tekstaro konverĝis relative rapide al tiuj stabilaj niveloj, kiujn mi sekve difinis reprezentaj por la tuta korpuso. Inter la rezultoj de la eksperimenta esploro kaj tiuj de la tekstesploro ne estas observeblaj iuj konstatoj sin reciproke kontraŭdiraj. Inter la rezultoj de la tri unuopaj grupoj de enketitoj konstateblas neniu alia devio de la suma averaĝo ol tiu, kiu estas klarigebla el pli altnivela lingvokonscio ĉe la profesiaj parolantoj kompare kun la neprofesiaj. Sur la bazo de ĉio ĉi estas pravigeble supozi, ke la vortorda sistemo en la nuntempa Esperanto, almenaŭ sur la kampoj de mi esploritaj, estas *aŭtonoma* sistemo.

El la kvin esplorkampoj, al kiuj mi koncentris la tekstesploron, estas kvar, kiuj montras bazan vicordon de la frazelementoj, kiu estas sintakse esprimebla. Unuavice temas pri la lokoj de la plennoma subjekto S kaj de la plennoma rekta objekto O rilate al la verbo V en informneŭtraj, asertaj ĉeffrazoj. La tiel difinita baza ordo estas SVO. Due temas pri la negacia partikulo *ne*, kies baza loko en informneŭtraj neaj frazoj, tiel en la kazo de tutfrazo, kiel en la kazo de frazparta negacio, estas antaŭverba (NegV). La tria baza ordo estas tiu de la rekta objekto O, kiu antaŭas la nerektan IO (O-IO). Kvare, sur la nivelo de substantiva vortgrupo, la baza ordo de la adjektivo kaj la substantivo estas AN. Sur unu esplorkampo, tiu de la maniera aŭ grada adverbo Adv (rolanta kiel adjektivo en frazo), kiu modifas verbon V, ne eblis establi sintakse esprimatan bazan ordon.

Ĉi tie, la tekstesploro montras statistike signifan preferon por AdvV kiel baza ordo, sed la rezultoj el la eksperimenta esploro estas malpli klaraj. Sur ĉiuj kvin kampoj, la fine decidota vortordo, elire bazita sur ĉi-supraj sintakse esprimitaj ŝablonoj, estas direktata de tri diversspecaj influfaktoroj aŭ stirfortoj: *pragmatikaj*, *semantikaj* kaj *strukturaj*, kiuj kapablas aŭ plifortigi aŭ kontraŭi sin reciproke. La roloj ludataj de pragmatikaj kaj semantikaj stirfortoj konformas al la elirpunktoj de la t.n. Funkcia Gramatiko (Dik 1997), kiun mi prenis kiel referencon por miaj esploroj. La struktura stirforto konformas al kognaj limigoj al la cerba kapablo prilabori kompleksajn lingvostrukturojn priskribitajn de Hawkins (1986).

Influante de la pragmatikaj funkcioj fokuso kaj topiko, tiel ĉe S, kiel ĉe O, kiel ankaŭ ĉe V, manifestiĝas tia moviĝemo, ke ne malpli ol dek procentoj de ĉiuj eblaj aperoj de S, V kaj O en iu permutio devias de la baza ordo SVO. La periferiaj pozicioj en la frazo (kp. Blümel 1914, Tomlin 1986) montriĝas tre taŭgaj por akcepti fokusajn frazelementojn. La inversigo de frazelementoj, kun la celo enfokusigi tiun aŭ alian elementon, montriĝas pli komuna ol la uzo de la fendita frazo. Videblas klara tendenco sekvi la t.n. LR-Principon, esprimitan en la formo de la sinsekvo Temo-Remo (ThRh) aŭ Topiko-Komento (TC) (kp. Mallinson/Blake 1981 kaj Dik 1997).²⁰

Tre kutimaj estas inversigoj de frazelementoj cele al la antaŭenigo de la topiko (kp. Weil 1879, Tomlin 1986). En la kazo de topika objekto, kiun oni volus iel forigi el ĝia kutima frazfina loko (SVO), la pasivigo de la frazo ne ĝuas preferon kompare kun la inversigo. En la kazo de la negacio, la pragmatika influo manifestiĝas kiel ŝovo de *ne* el ties antaŭverba pozicio en la antaŭfokusita pozicion, kiam sekvas eksplicita kontrasto.

La sinsekvo O-IO montriĝas influebla de la funkcioj fokuso kaj topiko (kp. Tomlin 1986). Sur la nivelo de la frazo, la fina elekto inter AdvV kaj VAdv estas klare influata de la eventuala enfokusigo de Adv. Ene de substantiva vortgrupo validas la samo: NA estas volonte elektata vicordo en la kazo de fokusa adjektivo.

Ankaŭ semantikaj stirfortoj influantaj la fine decidotan vortordon estas indikeblaj, kvankam malpli okulfrappe ol la jam priskribitaj pragmatikaj. En la kazoj de SVO kaj O-IO, la influeblo far la faktoro vivanteco estis eksplicite esplorita, sed ne pruvita. Sur la nivelo de vortgrupo, tamen, la influo estas demonstrebla: en kunordigoj de la tipo 'A kaj B', en kiuj rolas po unu vivanta kaj senviva elementoj, A estas prefere la vivanta; en la kazo de same vivantaj aŭ same senvivaj elementoj, A estas la pli pozitiva elemento, la pli 'bela', pli 'altranga', ktp. (kp. Behaghel 1928). En la kazo de SVO mi esploris kaj pruvis la influon de la faktoro difiniteco je la inversigeblo de la frazelementoj (kp. Tomlin 1986). Kiam A estas poseda pronomo en adjektiva pozicio, la inversigo AN > NA = NPoss, tamen, ne signas la fokusadon de Poss. Ĉi-kaze la regulo estas: en PossN, N estas difinita; en NPoss, N estas nedifinita.

La struktura stirforto influanta la fine decidotan vortordon (kp. Comrie 1983, Hawkins 1986) estas trovebla sur ĉiuj kampoj esploritaj. Ĝi signifas, ke pli kompleksaj, pli pezaj frazelementoj inklinas al pli malantaŭa loko en la frazo, dum pli simplaj, pli malpezaj estas pli facile antaŭenigeblaj. En la kazo de SVO tio signifas, ke plennomaj frazelementoj estas interpretataj pli kompleksaj ol pronomaj, kaj pluralaj kun la finaĵo -ojn pli kompleksaj ol la singularaj kun -on. En la ĉeesto de pronomaj objekto la distribuo de la permutioj de S, V kaj O estas konsiderinde alia ol en la ĉeesto de plennoma objekto. El la korpuso rezultas jenaj rondigitaj procentaĵoj: 55% de la esploritaj frazoj kun pronomaj objekto montras la bazan ordon SVO (kontraŭ 90% en la kazo de plennoma objekto), 13% aplikas SOV pro la malplipezeco, 32% aplikas iun el la permutioj OSV, OVS kaj VOS pro nedisigebla interludo de malplipezeco kaj pragmatikaj faktoroj. Ankaŭ en la kazo de O-IO, la inversigo al IO-O povas esti stimulata de relative peza O aŭ relative malpeza IO. Simile, NA anstataŭ AN kaj VAdv anstataŭ AdvV (en la tekstaro) montriĝas favoraj opcioj por pezaj adjektivoj kaj adverboj.

Resume, la fina decido pri la vortordo, kiun parolanto elektas en sia konkreta parol-ago, estas direktata de faktoroj pragmatikaj, semantikaj kaj strukturaj. La detalaj analizoj kiuj kondukis ĉi tien montras, ke tiu procezo sekvas la universalajn, kiujn mi elektis kontrolcele kaj al kiuj detale resendas la sintezo de la du esplorlinioj. Sekve, la antaŭe faritan konkludon pri la

²⁰ Laŭ la LR-Principo, la 'Principo pri la Deliva Dekstrena Frazorganizo', frazelementoj inklinas lokiĝi de live dekstren laŭ vicordo de sia kreskanta noveco aŭ nekonateco al la aŭskultanto.

aŭtonomeco de la vortordo en Esperanto ni povas plivastigi per la konstato, ke ĝi reprezentas krome *naturan* sistemon.

Rezulte de la komparoj, kiujn mi faris inter fenomenoj troveblaj en la lingvaĵo de 1887 kaj tiuj en la nuntempa lingvaĵo, oni estas rajtigita supozi, ke la evoluo inter 1887 kaj 2007 okazis sen grandaj malkontinuo. Frupoke, la vortordo SVO estis nombre superrega kaj ne ĉiuj aliaj permutoj de S, V kaj O ĉeestis, sed pragmatika kaj struktura influado de SVO estas retrovebla jam en la plej fruaj Zamenhofaj tekstoj.

La du ebloj O-IO kaj IO-O estis ekvilibre reprezentitaj, sed jam montris grandan strukturan influeblon. AN forte superregis, sed jam malkaŝis preferon por inversiĝo en la kazo de komplekseco kaj/aŭ fokuseco de A. En la plej frua materialo Zamenhofa, Adv ŝajne manifestis sin libere movebla inter la antaŭverba kaj postverba pozicioj, kaj ankaŭ la esplorita nuntempa materialo ne montras unusencan preferon por tiu aŭ alia sintakse esprimebla elekto. Male, subtilan diferencon ni trovas inter la negacio en la fruaj tekstoj kaj la esplorita nuntempa lingvaĵo de Esperanto. Frupoke ne ekzistis VNeg sen eksplicita kontrasto, sed ĝi aperas, kvankam marĝene, en la esplorita korpuso, kaj en la respondoj de la enketitoj ĝi formas neneglekteblan malplimulton. Ĉi tiu (limigita) uzo ŝajnas fonto en la forma identeco en Esperanto (*ne*) de la nuliga vortoperatoro (kp. angle *no*, germane *kein*), la ofte aparte skribita negacia prefikso (kp. angle kaj germane *un-*) kaj la nea frazoperatoro (kp. angle *not* eventuale akompanata de la helpverbo *do*, germane *nicht*).

Ekzistas lernolibroj, kiuj ignoras la diferencon inter la tri formoj de neado. Se nuligita vorto X_{Neg} hazarde staras postverbe, la konstruo estas interpretebla kiel rezulto de inversigo $NegV > V_{Neg}$ por doni pli da emfazo al la neo de la tuta frazo. Tia interpreto, tamen, fiaskas, ĉar la forigo de *ne* el ties tuj antaŭverba pozicio kontraŭdiras tion.

Alia interpreto eliras de $NegV$ kiel baza ordo por la senfokusa negacio de fraza parto, tiel ke V_{Neg} reprezentus la fokusatan negacion de tiu fraza parto. Ankaŭ tiu ĉi interpreto estas malsukcesa, ĉar tia negacio, laŭ la fruaj atestaĵoj, postulas eksplicitan kontraston: $X_{Neg}Y$, legata kiel $V_{Neg}Y$, devas esti sekvata de ‘sed Z’.²¹ V_{Neg} sen eksplicita kontrasto ŝajnas esti spertata kiel eldiro nefinita, iel kolizianta kontraŭ la postuloj pri kompleteco kaj rilevo en komunika kunteksto (Grice 1975).²² Tio, ke la uzo de senkontrasta V_{Neg} aperas malplimulta aŭ eĉ marĝena en la nuntempa lingvaĵo, povus pruvi, ke la parolantaro subkonscie dementas la trosimpligite formulitan regulon pri la negacio (“*Ne staru antaŭ tio, kion oni volas nei*”) pro ties komunika neakceptebla en certaj kazoj.

En mia enkonduko en la prezentatan studon mi pravigis la elekton de Esperanto kiel esplorobjekton, menciante la grandan nombron da sociaj aplikoj de la lingvo, la naturan trakton de la lingvo far ties uzantoj kaj la grandan liberecon, kiun oni havas formante konstruaĵojn gramatike korektajn kaj komunike akcepteblajn.

Rezulte de la sekva esploro mem, la lingvo, malgraŭ sia neordinara origina konstruiteco, manifestas sin kiel aŭtonoma, evoluanta sistemo, ne kontraŭdiranta la universalizaĵojn ĉi tie uzitajn kaj portata de internacia parolantaro kun klara konscio pri sinreguligo.

Ĉi tial Esperanto estas proponenda kiel taŭga testejo, ne nur de ĝenerallingvistikaj teorioj pri vortordo, sed ankaŭ de aliaj hipotezoj kaj teorioj pri la homaj lingvo kaj lingvo-uzo.

²¹ Ekzemple: ‘Mi mendis ne bieron, sed vinon’, kiu montriĝas informe kompleta.

²² Ekzemple: ‘Mi mendis ne bieron’, kiu lasas la aŭskultanton kun demando pri la senco de la eldiro.

Glosaro (inter krampoj staras la mallongigoj uzitaj en la teksto)

fokuso	(F) frazparto juĝata informvalora kaj tial emfazata de la parolanto aŭ skribanto. Komplementa al fono (G).
fono (G)	frazparto juĝata de fona valoro kaj tial ne emfazata de la parolanto aŭ skribanto. Komplementa al fokuso (F).
informneŭtra	(Neutr) neŭtra rilate la informvaloron, t.e. senemfaza kaj kvazaŭ eksterkunteksta.
komento	(C) tio, kion oni diras pri la topiko (T).
operatoro	partikulo kun gramatika funkcio.
plennoma	kiu ne estas pronomo.
pragmatiko	studo de la aspektoj de lingvo-uzo, t.e. de la intencoj kaj mesaĝoj, kiujn parolanto/skribanto lingve transdonas al aŭskultanto/leganto.
remo (Rh)	tio, kio estas nekonata al la aŭskultanto aŭ leganto. Komplementa al temo (Th).
rileva	aferkoncerna.
ŝablono	modelo, ripetiĝanta konstruo.
temo (Th)	tio, kio estas konata al la aŭskultanto aŭ leganto. Komplementa al remo (Rh).
topiko (T)	tio, pri kio oni faras aserton, 'pri kio temas'. Komplementa al komento (C).

4.1.3 Konciza biografio

* 7.3. 1948	en Amsterdam
1970	Magistro (M.Sc.) de la Teknika Universitato en Delft, inĝeniero por aera kaj spacvetura tekniko
1974-1989	Kunlaboro en la Eŭropa Spacagentejo (European Space Agency, ESA) kiel inĝeniero pri projektoj kaj manaĝado
1989	Magistro (M.A.) pri kompara lingvistiko (specialiĝo pri la eŭska lingvo) en la Universitato Leiden
1989-1998	Respondeca pri la ellaborado kaj enkonduko de programo por sciencaj eksperimentoj en la kampo de senpezeco de senhomaj sovetaj kaj rusaj satelitoj
1992	Starigo de propra laboratorio en Moskvo por ĉiuj laboroj, kiuj koncernas la preparon de scienca kargo antaŭ kaj post la spacflugo kaj la telemezurado de datumoj koncernantaj la satelitojn en la orbito
Ekde 1998	Memstara laboro kiel lingvo-instruisto kaj esploristo
2002	Partotempa docento pri interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdam
2007	Doktoriĝo pri lingvistiko (esperantologio)

(Ankaŭ vidu: <http://home.medewerker.uva.nl/w.h.jansen>)

4.1.4 Ĉefaj publikigaĵoj

-1990. ‘A numerical review of three Basque dialects’ en *International Journal of Basque Linguistics and Philology*, ASJU, XXIV-3: 889-894.

-1992. ‘Acento y entonación en Elorrio [Accent and Intonation in the Elorrio variety of Basque]’ en *International Journal of Basque Linguistics and Philology*, ASJU, XXVI-2 : 391-440. (Hispana traduko de anglalingva magistra disertacio).

-1992. ‘La rusa lingvo en la novaj rilatoj de Eŭropa Spac-Agentejo [The Russian language in the new relations of the European Space Agency]’ en *Language Problems and Language Planning*, vol. 16, No. 3, 1992: 253-259. (Kun resumoj en la angla kaj franca).

-1993. ‘*The Story of Moslab* (Noordwijk, European Space Agency). (Paralelaj tekstoj en la angla, franca kaj rusa). 86 p.

-1996. *Baskisch-Nederlands, Nederlands-Baskisch* (Noordwijk, la aŭtoro). (La unua vortaro eŭska-nederlanda, nederlanda-eŭska). 301 p.

-1996. *Korte brochure over de internationale taal Esperanto* [Konciza broŝuro pri Esperanto] (Vereniging Esperanto Nederland). Fotoreproduktaĵo de la Unua Libro en la nederlanda okaze de la centjariĝo de Esperanto en Nederlando. 28 p.

-1996. *Esperanto, Van taalproject tot levende taal* [Esperanto, de lingvo-projekto al vivanta lingvo] (Vereniging Esperanto Nederland, represita 1999). Popularscienca enkonduko. 22 p.

-1998. *Basque-English, English-Basque, Dictionary and Phrasebook* (New York, Hippocrene Books Inc.). Kunaŭtoroj Joseph Conroy kaj Aitor Arana. 208 p.

-1999. ‘Zuiverheid en zuivering in het Baskisch [Pureco kaj purigo en la eŭska]’, en Nicoline van der Sijs (red.): *Taal trots. Purisme in een veertigtal talen* [Lingva fiero. Purismo en ĉirkaŭ 40 lingvoj] (Contact, Amsterdam/Antwerp): 287-290. Pri purismo en la eŭska.

-2001. *Biological Experiments on the Bion-10 Satellite* (Noordwijk, European Space Agency). Kun-aŭtoroj dr. R. Demets and E. Simeone. 125 p.

-2001. *Het geheim van het meer* [La mistera lago] (Groningen, Gopher Publishers). La unua libro por infanoj rekte tradukita el la eŭska en la nederlandan. Originala titolo: Urtegi misterioetsua. 66 p.

-2002. *Beginner's Basque* (Hippocrene Books Inc., New York). Lernolibro eŭska por anglalingvaj komencantoj. 283 p.

-2002. *Relax!* (Amsterdam, Veen). Eseoj kaj artikoloj pri lingvo kaj kulturo, en la nederlanda, 176 p.

-2002. ‘De kunsttaaloctie in de talige toekomst van Europa [La propono de artefarita lingvo en la lingva estonteco de Eŭropo]’ en *De talige toekomst van Europa - volgens een plan?* [La lingva estonteco de Eŭropo ĉu laŭplana?]: 1-14. Interna publikaĵo no. 73 de la Instituto por Ĝenerala

Lingvistiko de la Universitato de Amsterdam. Teksto de prelego por simpozio kun la sama titolo, prezentita en Amsterdamo, la 17-an de decembro.

-2003. 'Studoj pri interlingvistiko/Studien zur Interlinguistik' en *Language Problems & Language Planning*, vol. 27, issue 3: 279-289. Recenzo de festlibro por Detlev Blanke 'Studoj pri interlingvistiko/Studien zur Interlinguistik', editoritaj de Sabine Fiedler kaj LIU Haitao (Kava-Pech, Dobřichovice/Prago, 2001). (en la angla).

-2004. 'Esperanto' en *Neerlandia*, numero 4: 31-33. (nederlanda artikolo).

-2004. 'Esperanto -een taal zonder vanden [Esperanto – lingvo sen vandaloj]' en *Linguaan*, numero 9: 27.

2005. 'Esperanto. Spiltaal in een meertalige omgeving [Esperanto. Tradukpera lingvo en multlingva ĉirkaŭo]' en *Linguaan*, n-ro 4: 8-11.

-2005. *Een Europese lingua franca? Opties en risico's* [Eŭropa lingua franca? Ebloj kaj riskoj]. Prelego prezentita al kunveno de la asocio 'Orde van den Prince', Gent, Flandrio, 15-a de aprilo.

-2006. 'Farita profesie – kaj enhave kaj aspekte' in *Esperanto*, vol. 99, issue 1192(5): 111-112. Recenzo pri la libro 'Symposium on Communication Across Cultural Boundaries', editorita de Christer Kiselman (Kava-Pech, Dobřichovice/ Prago, 2005).

-2006. 'Een wereldtaal. De geschiedenis van het Esperanto [Mondlingvo- La historio de Esperanto]' en *Language Problems & Language Planning*, vol. 30, 1: 89-92. Recenzo pri 'Een wereldtaal. De geschiedenis van het Esperanto' de Marc van Oostendorp (Athenaeum – Polak & Van Gennep, Amsterdam, 2004). (en la germana).

-2006. *Elementen uit de interlinguïstiek* [Elementoj de interlingvistiko]. Interna publikaĵo de la Universitato de Amsterdam: Lernolibro por studentoj, laŭ bakalaŭro-nivelo de interlingvistika kurso. Kvara revizio de la unua eldono de 2002. 252 p.

-2006. *Esperanto. Kanttekeningen bij de taal en de taalgemeenschap* [Esperanto. Notoj pri la lingvo kaj ĝia parol-komunumo]. Interna publikaĵo de la Universitato de Amsterdam por bakalaŭra nivelo de Esperanto-kurso. 22 p.

-2006. 'Das Niederländische im Kontext der europäischen Sprachenpolitik [La nederlanda en la kunteksto de eŭropa lingvo-politiko]' en Blanke, Detlev (ed.) *Sprachenpolitik und Sprachkultur* [Lingvo-politiko kaj lingvo-kulturo] Interlinguistische Informationen, Beiheft (Konferencaktoj) 13, Berlin: 93-104.

2007. 'Das Niederländische im Kontext der europäischen Sprachenpolitik [La nederlanda en la kunteksto de eŭropa lingvo-politiko]' en: Blanke, Detlev /Jürgen Scharnhorst (ed.) *Sprachenpolitik und Sprachkultur* (Peter Lang, Frankfurt): 121-137.

2007. Wortstellungsmodelle im ursprünglichen und im heutigen Esperanto - Zeugen einer natürlichen Entwicklung der Syntax? [Wortordo-modeloj en la origina kaj nuntempa Esperanto – ĉu pruvoj por natura evoluo de la sintakso?] en Blanke, Detlev (ed.) *Esperanto heute. Wie aus einem Projekt eine Sprache wurde* [Esperanto nuntempe – kiel el projekto fariĝis lingvo] .Interlinguistische Informationen, Beiheft [Konferencaktoj] 14, Berlin: 15-26.

2007. *Woordvolgorde in het Esperanto. Normen, taalgebruik en universalialia* [Vortordo en Esperanto – normoj, lingvo-uzo kaj universalajoj] Amsterdam: Amsterdam Center for Language and Communication (ACCL) / Netherlands Graduate School of Linguistics (LOT), 283 p. (ISBN 978-90-78328-36-0). Doktoriga disertacio en la nederlanda kun resumoj en la angla, Esperanto kaj germana.

4.2 Magistriĝo en Łodz (K. Szalapska)

Katarzyna Szalapska verkis sian magistran disertacion pri la temo „Esperanto en interkultura komunikado“ en la Altlernejo por Internaciaj Studoj en Łodz. Precizaj bibliografiaj informoj mankas (pri la enhavo vidu Pola Esperantisto 3/2007 (Nr. 27), S. 28).

4.3 En Poznań: Interlingvistika sesio kaj instruista trejnado

La aŭtuna sesio de la Interlingvistikaj Studoj (14-21.09.2007) atendis la partoprenantojn kun pli riĉa programo ol kutime, ĉar en la tria jaro de la studoj okazas specialiĝo, ĉi foje pri komunikado, lingvistiko kaj lingvopedagogio. *István Ertl* prelegis por ĉiuj pri la nuntempa e-literaturo kaj analizis kelkajn verkojn. La kurso de la bone konata psikologo kaj verkisto *Claude Piron* pri psikologiaj aspektoj de komunikado katenis la atenton de la aŭskultantoj. *Ilona Koutny*, gvidanto de la Studoj, prezentis lingvistikajn aspektojn de komunikado, i.a. esploris la e-lingvan bildon de la mondo.

Enkadre de la lingvopedagogia specialiĝo, destinita al instruantoj kaj instruantoj de esperanto, *Katalin Kováts*, prizorganto de la elstara instruista forumo www.edukado.net enkondukis la partoprenantojn al la bazaj faktoroj de lingvoinstruado kaj *Maria Majerczak*, metodikistino de la Jagiellona Universitato en Krakovo, traktis metodikon. Al la programo kontribuis ankaŭ *Zsófia Koródy*, vicprezidanto de ILEI.

La nuna sesio estis specifa, ĉar la lingvopedagogia specialiĝo realiĝis en la kunlaboro de UAM kun ILEI, kaj pro tio povis aliĝi ankaŭ kromaj partoprenantoj (7 personoj el 4 landoj). La kunordigita instruista trejnado daŭros unu jaron (kun reta konsultiĝo inter la sesioj). Tiuj ĉi kursanoj sekvis krome minikurson pri literaturo (*István Ertl*) kaj pri movadhistorio (*Aleksander Korjenkov*) kaj povis aŭskulti donace la aliajn proponitajn kursojn de la Interlingvistikaj Studoj. Kiel tradicie, semajnfine la kultura aranĝo Arkones (ĉi-foje sub la aŭspicio de UEA) amuzis la partoprenantojn per apudaj programeroj: koncertoj (i.a. *Anjo Amika*, *Zuzanna Kornicka*, *JoMo*), filmoj, diskutrondoj kaj prelegoj, kiuj kompletigis la universitatajn kursojn (de *Piron*, *Ertl*, *Ligeza*, *Chmielik*, *Koródy*, *Koutny*, *Stano Marček*, *Malewicz*, *Rokicki* k.a.) kaj donis eblecon ankaŭ al la gestudentoj kontribui (ekz. *Reza Torabi* pri Irano, repa koncerto de *Marteno Minich*, *Peter Balaj* pri E@I).

Ilona Koutny

5 Bibliografio de publikaĵoj de Klaus Schubert – elekto

En IpI 61-62, p. 32 ni informis pri la habilitacia verko de prof. d-ro Klaus Schubert. Nun sekvas elekto de interlingvistike gravaj verkoj el lia riĉa bibliografio (kiu komplete aperis en „Interlinguistische Informationen“, n-ro 64-65, p. 6-18). Kompreneble ofte malfacilas decidi, kio el la riĉa verkaro de Schubert estas „interlingvistike grava“. Multaj publikaĵoj liaj pri aŭtomata tradukado havas rilatojn al DLT aŭ al Esperanto.

5.1 Libroj

(1986): Syntactic Tree Structures in DLT. Utrecht: BSO/Research, 211 p.

(1987): *Metataxis. Contrastive Dependency Syntax for Machine Translation*. (Distributed Language Translation 2.) Dordrecht/Providence: Foris, 250 p.

Papegaaïj, Bart; Klaus Schubert (1988): *Text Coherence in Translation*. (Distributed Language Translation 3.) Dordrecht/Providence: Foris, 211 p.

5.2 Eldonado/redaktado de libroj

Hg. = Herausgeber = Eldonanto/Redaktoro

Maxwell, Dan; Klaus Schubert, Toon Witkam (Hg.) (1988): *New Directions in Machine Translation*. (Distributed Language Translation 4.) Dordrecht/Providence: Foris, 259 p.

Schubert, Klaus (kun Dan Maxwell) (Hg.) (1989): *Interlinguistics – Aspects of the Science of Planned Languages*. (Trends in Linguistics, Studies and Monographs 42.) Berlin/New York: Mouton de Gruyter, 348 p.

Maxwell, Dan; Klaus Schubert (1989 Hg.): *Metataxis in Practice. Dependency Syntax for Multilingual Machine Translation*. (Distributed Language Translation 6.) Dordrecht/Providence: Foris, 323 p.

(Hg.) (2001): *Planned Languages: From Concept to Reality*. Brussel: Hogeschool voor Wetenschap en Kunst, 257 p.

paralele en du kajeroj de revuo:

(Hg.) (2000-2001): *Planned Languages: From Concept to Reality. = Interface*. Tijdschrift voor Toegepaste Linguïstiek / Journal of Applied Linguistics 15 [1] (2000) + 15 [2] (2001).

5.3 Eldonado de revuoj (membro de la redakto-komitatoj)

Language Problems and Language Planning, jare tri kajeroj.. Redakcio 1990-1998: Probal Dasgupta, Humphrey Tonkin, Klaus Schubert. Amsterdam/ Philadelphia: Benjamins.

5.4 Studoj/artikoloj

(1985): “Svenskan som ett möjligt målspråk i halvautomatisk översättning.” En: Sture Allén k.a. (Hg.): *Svenskans beskrivning 15*. Göteborg: Göteborgs universitet, 464-473.

(1986): “Wo die Syntax im Wörterbuch steht. Esperanto als Brückensprache der maschinellen Übersetzung.” En: Armin Burkhardt, Karl-Hermann Körner (Hg.): *Pragmantax*. Tübingen: Niemeyer, 449-458.

(1986): “Linguistic and Extra-Linguistic Knowledge. A Catalogue of Language-Related Rules and Their Computational Application in Machine Translation.” En: *Computers and Translation 1*: 125-152.

(1988): “Att knyta Nordens språk till ett mångspråkigt datoröversättningssystem.” En: *Nordiske Datalingvistikdage og Symposium for datamatstøttet leksikografi og terminologi, Proceedings*. (Lambda 7.) [København]: Handelshøjskolen i København, 204-216.

(1988): “Implicitness as a Guiding Principle in Machine Translation.” En: Dénes Vargha (Hg.): *Coling Budapest*. Budapest: John von Neumann Society for Computing Sciences, 599-601.

(1988): “Ausdruckskraft und Regelmäßigkeit: Was Esperanto für automatische Übersetzung geeignet macht.” En: *Language Problems and Language Planning* 12: 130-147.

Tradukoj:

(1987): “De artefarita lingvo al lingvo de artefarita inteligento.” *Literatura Foiro* 18 [109]: 9-20.

(1992): “Frá gjørdum máli til mál hjá gjørdum intelligensi.” En: *Málting* 2 [1]: 31-39.

(1994): “Inter homo kaj komputilo. Kio igas Esperanton taŭga por perkomputila tradukado. En: ” Hans Michael Maitzen, Herbert Mayer, Zlatko Tišljár (Hg.): *Aktoj. Internacia scienca simpozio “Esperanto 100-jara”*. Vieno: Esperanto-Laborkomitato Aŭstria / Vieno: Pro Esperanto / Maribor: Inter-Kulturo, 14-30.

Schubert, Klaus (1997): “Ausdruckskraft und Regelmäßigkeit: Was Esperanto für automatische Übersetzung geeignet macht.” En: Humphrey Tonkin (Hg.): *Esperanto, Interlinguistics, and Planned Language*. Lanham/New York/Oxford: University Press of America, 117-139.

(1988): “An Intermediate Language in Language Technology.” En: Eddy Rosseel, Edward Symoens (Hg.): *La intereso kaj utilo de komuna interlingvo/ The Relevance of a Common Intermediate Language/ L'intérêt d'une langue intermédiaire commune*. Bruxelles: AIMAV [separat].

(1988): “The Architecture of DLT – Interlingual or Double Direct?” En: Dan Maxwell, Klaus Schubert, Toon Witkam (Hg.): *New Directions in Machine Translation. (Distributed Language Translation 4.)* Dordrecht/Providence: Foris, 131-144.

(1989): “Agmanieroj, fazoj, verbaj klasoj – serĉante interlingvistikan terminon.” En: Ryszard Rokicki (Hg.): *13a Scienca Interlingvistika Simpozio 1985. (Acta Interlinguistica 3.)* Varsovio: Akademickie Centrum Interlingwistyczne, 119-130.

(1989): “Interlinguistics – Its Aims, Its Achievements, and Its Place in Language Science.” En: Klaus Schubert (mit Dan Maxwell) (Hg.): *Interlinguistics – Aspects of the Science of Planned Languages. (Trends in Linguistics, Studies and Monographs 42.)* Berlin/New York: Mouton de Gruyter, 7-44.

(1989): “An Unplanned Development in Planned Languages. A Study of Word Grammar.” En: Klaus Schubert (mit Dan Maxwell) (Hg.): *Interlinguistics – Aspects of the Science of Planned Languages. (Trends in Linguistics, Studies and Monographs 42.)* Berlin/New York: Mouton de Gruyter, 249-274.

(1989): “Dependency Syntax for Parsing and Generation.” En: Dan Maxwell, Klaus Schubert (Hg.): *Metataxis in Practice. Dependency Syntax for Multilingual Machine Translation. (Distributed Language Translation 6.)* Dordrecht/Providence: Foris, 7-15.

(1989): “A Dependency Syntax of Esperanto.” En: Dan Maxwell, Klaus Schubert (Hg.): *Metataxis in Practice. Dependency Syntax for Multilingual Machine Translation. (Distributed Language Translation 6.)* Dordrecht/Providence: Foris, 207-232.

- (1989): "The Theory and Practice of Metataxis." En: Dan Maxwell, Klaus Schubert, (Hg.): *Metataxis in Practice. Dependency Syntax for Multilingual Machine Translation.* (Distributed Language Translation 6.) Dordrecht/Providence: Foris, 233-245.
- (1989): "Idioms in a Translation Grammar." En: Martin Everaert, Erik-Jan van der Linden (Hg.): *Proceedings of the First Tilburg Workshop on Idioms.* Tilburg: Katholieke Universiteit Brabant, Instituut voor Taal- en Kennistechnologie, 159-170.
- (1989): "Dictionary, Term Bank, Thesaurus, Knowledge Bank. On Knowledge Sources for Multilingual Machine Translation."
- (1990) Tonkin, Humphrey; Probal Dasgupta, Klaus Schubert : "Editorial Perspectives: A New Decade and a New Direction." In: *Language Problems and Language Planning* 14: 85-90.
- (1991): "Vom theoretischen Entwurf zu praktischen Entscheidungen: das halbautomatische Übersetzungssystem DLT." En: Werner Bahner, Joachim Schildt, Dieter Viehweger (Hg.): *Proceedings of the Fourteenth International Congress of Linguists.* Bd. 3. Berlin: Akademie-Verlag, 2318-2320.
- (1991): "Menschliche Sprache oder künstliches Symbolsystem? Erfahrungen mit Plansprachen in der automatischen Übersetzung." En: *Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung* 44: 688-694.
- (1992): "Esperanto as an Intermediate Language for Machine Translation." En: John Newton (Hg.): *Computers in Translation.* London/New York: Routledge, 78-95.
- (1993): "Semantic Compositionality: Esperanto Word Formation for Language Technology." En: *Linguistics* 31: 311-365.
- (1996): "Zum gegenwärtigen Stand der maschinellen Übersetzung." En: Ulrich Becker (Hg.): *Translation in Plansprachen. (Interlinguistische Informationen, Beiheft 1.)* Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik, 14-33.
- (1997) Schubert, Ingrid; Klaus Schubert: "Condizioni e possibilità di automazione nell'insegnamento a distanza dell'esperanto." En: *L'insegnamento delle lingue a distanza. Principi ed esperienze. = Istruzione a distanza* 9, Terza serie, Numero speciale 7: 83-103
- (2000): "Eine Plansprache als Qualitätsfaktor beim Relaisdolmetschen?" En: Sylvia Kalina, Silke Buhl, Heidrun Gerzymisch-Arbogast (Hg.): *Dolmetschen: Theorie, Praxis, Didaktik. (Arbeitsberichte des Advanced Translation Research Center [ATRC] an der Universität des Saarlandes 2.)* St. Ingbert: Röhrig Universitätsverlag, 137-157.
- (2001): "Optimumigo de la internacia komunikado: interlingvistika rigardo al la nova industria lingvokonstruado." En: Sabine Fiedler, Liu Haitao (Hg.): *Studoj pri interlingvistiko / Studien zur Interlinguistik. Festschrift für Detlev Blanke zum 60. Geburtstag. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke.* Dobřichovice (Praha): Kava-Pech, 172-183.
- (2001): "Plansprachen zwischen Plan und Sprache. Einleitung." En: Klaus Schubert (Hg.): *Planned Languages: From Concept to Reality.* Brussel: Hogeschool voor Wetenschap en Kunst, 5-9.

(2001): "Gestaltete Sprache. Plansprachen und die regulierten Sprachen der internationalen Fachkommunikation." En: Klaus Schubert (Hg.): *Planned Languages: From Concept to Reality*. Brussel: Hogeschool voor Wetenschap en Kunst, 223-257.

(2002)[Schubert] Šubert, Klaus: "Meždunarodnaja special'naja komunikacija: praktika i teorija v procesje izmenenija." En: *Vestnik Voronežskogo Gosudarstvennogo Universiteta*, Serija Lingvistika i mežkul'turnaja komunikacija [2]: 68-85.

(2003): "Plansprachen und internationale Fachkommunikation." En: Detlev Blanke (Hg.): *Plansprachen und elektronische Medien. (Interlinguistische Informationen, Beiheft 9.)* Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik, 150-161.

(2004): "Interkulturelle Sprache." En: Ina Müller (Hg.): *Und sie bewegt sich doch... Translationswissenschaft in Ost und West. Festschrift für Heidemarie Salevsky zum 60. Geburtstag.* Frankfurt am Main u. a.: Lang, 319-331.

(2006): "Interlinguistik und Kommunikationsoptimierung." En: A. Künnap, W. Lehfeldt, S. N. Kuznecov (Hg.): *Mikrojazyki, jazyki, interjazyki. Sbornik v čest' ordinarnogo profesora Aleksandra Dmitrieviča Duličenko.* Tartu: Universitas Tartuensis / Tartu Ülikool / Tartuskij Universitet, 486-492 – http://www.klausschubert.de/forschung/fo_publ.htm .

5.5 Recenzioj

(1992): "[Arne Juul, Hans F. Nielsen (Hg.) (1989): *Otto Jespersen. Facets of His Life and Work.* Amsterdam/Philadelphia: Benjamins]." En: *Language Problems and Language Planning* 16: 181-187.

(1992): "[Aleksandr Dmitrievič Duličenko (1990): *Meždunarodnye vspomogatel'nye jazyki.* Tallinn: Valgus]." En: *Language Problems and Language Planning* 16: 291-294.

(1993): "[Zygmunt Stoberski (1989/1990): *The Road to Transnationalization of Terminology.* Warsaw: International Organization for Unification of Terminological Neologisms/World Bank of International Terms]." En: *Language Problems and Language Planning* 17: 86-87.

(1993): "[Eberhard Kleinschmidt (Hg.) (1989): *Fremdsprachenunterricht zwischen Sprachenpolitik und Praxis.* Tübingen: Narr]." En: *Language Problems and Language Planning* 17: 80-82.

(1997): "[Rasmus Kristian Rask (1996): *Traktatu d' un linguaž universale.* Hg. Alicja Sakaguchi. Frankfurt am Main u.a.: Peter Lang]." En: *Language Problems and Language Planning* 21: 90-92.

(1997): "[Ingvar Stenström (1995): *Interlingua-svensk ordbok.* Lund: Studentlitteratur]." En: *Language Problems and Language Planning* 21: 98-100

(1997): "[Jürgen Scharnhorst (Hg.) (1995): *Sprachsituation und Sprachkultur im internationalen Vergleich.* Frankfurt am Main u.a.: Peter Lang]." En: *Language Problems and Language Planning* 21: 193-195.

(1997): "Interlinguistik dokumentiert."
[= Recenza artikolo pri:]

- François Lo Jacomo, Detlev Blanke (1993): Pri kelkaj problemoj de interlingvistiko. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
 - Claude Piron (1994): Psychological Reactions to Esperanto. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
 - Andrea Chiti-Batelli, Pierre Janton (1995): Politika hegemonio kaj lingva hegemonio en Eŭropo. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
 - Detlev Blanke, Wera Blanke (1995): Esperanto kaj lingvistiko – sciencpolitikaj aspektoj. + Fakvortoj en Esperanto – Kion fari se la vortaro ne plu helpas? Osnabrück: Deutsches Esperanto-Institut.
 - István Ertl, François Lo Jacomo (1996): L'espéranto et le plurilinguisme de l'avenir. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
 - Humphrey Tonkin, Mark Fettes (1996): Esperanto Studies: An Overview. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
 - Andrea Chiti-Batelli (1997): Pour une politique de l'espéranto. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.].
- (En: Language Problems and Language Planning 21: 254-259)

(1999): “[Beiträge zur Interlinguistik. (1995): Mitteilungen aus dem Institut für Sprachwissenschaft der Universität Innsbruck, Report 7. Innsbruck: Universität Innsbruck].” En: Language Problems and Language Planning 23: 83-86.

(1999): “[Heidemarie Salevsky (Hg.) (1996): Dolmetscher- und Übersetzer Ausbildung gestern, heute und morgen. Frankfurt am Main u.a.: Peter Lang].” En: Language Problems and Language Planning 23: 104-107.

(2000): “[Heiner Eichner, Peter Ernst, Sergios Katsikas (Hg.) (1996): Festschrift für Otto Back zum 70. Geburtstag. Wien: Edition Praesens].” En: Language Problems and Language Planning 24: 204-207.

5.6 Recenzetoj

(1982): “Du makedonaj libroj. [T. Dimitrovski, B. Koneski, T. Stamoski (Hg.) (1982): Por la makedona lingvo. Zagreb: IKS].” En: Esperanto 75: 192.

(1983): “Aktuala, densa informaro. [Detlev Blanke u.a. (1982): Esperanto und Wissenschaft. Berlin].” En: Esperanto 76: 114-115.

(1985): “Dek kvar interlingvistikaj prelegoj. [Ryszard Rokicki (Hg.) (1984): Sciencna interlingvistika simpozio. Varsovio: Akademickie Centrum Interlingwistyczne].” En: Esperanto 78: 11-12.

(1985): “Reapero de prastudo. [René de Saussure [Antido]: La logika bazo de vortfarado en Esperanto. [1910] Nachdruck Saarbrücken: Iltis 1984].” En: Esperanto 78: 53-54.

(1985): “Debat-instiga kajero de sovetia interlingvistiko. [Aleksandr Dmitrievič Duličenko (Hg.) (1984): Istorija i sovremennoe sostojanie interlingvistiki. Interlinguistica Tartuensis 3. Tartu Riikliku Ülikooli toimetised/ Učenyje zapiski Tartuskogo gosudarstvennogo universiteta / Acta et commentationes Universitatis Tartuensis 671].” En: Esperanto 78: 72.

(1986): “Faksperta sukceso montras bezonojn. [1983 MLA International Bibliography of Books and Articles on the Modern Languages and Literatures. New York: MLA 1984].” En: Esperanto 79: 21.

(1986): “[Violin Oljanov (Hg.) (1985): Interlingvistiko – esperantologio. Sofio: BEA].” En: Esperanto aktuell 5 [2]: 27-28.

(1988): “Festlibro estas fascina spegulo de la centjara Movado. [José-Luis Melena Jiménez k.a. (Hg.) (1987): Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo. Bd. 2: Esperantismo. La Laguna: Universidad].” En: Esperanto 81: 134-135.

(1988): “[Sergej Nikloaevič Kuznecov (1987): Teoretičeskie osnovy interlingvistiki. Moskva: Izdatel'stvo Universiteta družby narodov].” En: Informilo por interlingvistoj [2/17]: 3-4.

(1988): “Afrika planlingvo.” En: Informilo por interlingvistoj [2/17]: 5.

(1989): “An International Language for Mathematics (Rejoinder).” En: The Mathematical Intelligencer 11 [4]: 4.

(1994): “Monumento de monaĥa studlaboro. [Ebbe Vilborg (1992): Ordbok svenska-esperanto. Malmö: Esperantoförlaget].” En: Esperanto 87: 173.

(1994): “Esperanto: Konzepte und Strukturen.” En: Das Kommunikations- und Sprachenproblem in der Europäischen Gemeinschaft – Inwieweit könnte eine Plansprache zu einer Lösung beitragen? Brüssel: Hanns-Seidel-Stiftung, 96-104.

(1997): “DLT – faktoj pri finita projekto.” En: Eventoj [138-139]: 4-5.

Represo: Schubert, Klaus (1999): “DLT – resuma raporto.” En: Informilo por interlingvistoj 8 [1/28]: 2-3

6 Korektoj pri Bratanov

En IpI 61-62, p. 21, ni informis pri bulgarlingvaj studoj de la sciencisto Ivo Bratanov. En la adreso sekve ankaŭ devos aperi la antaŭnomo Ivo (kaj ne Ivan).

La studoj 2004 „Osobnosti...“ kaj „Predavane...“ (sube) rilatas al fragmento de la romano „Sub la jugo“ el la jaro 1904.

Ni forgesis mencii:

Bratanov, Ivo (2005): Predavane na toponimi v esperantskite perevodi na romana „Pod igoto“ ot Ivan Vazov. En: Naučni trudove. Tom 44, serija 7.1. Majski naučni četenija. Ruse: Rusenski universitet „Angel K'nčev“. Trudove na jubilejna naučna konferencija 2005. p. 14-18.

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvo-Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.esperantic.org ISSN 1385-2191. Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.:+ 49-30-54 12 633, fakso:+ 49-30-54 56 742, dblank.gil@snafu.de. Mendu nur ĉe UEA. Kontribuojn sendu nur al la redaktoro, per retpoŝto aŭ sur diskedo/KD. Artikoloj sen indiko pri aŭtoreco estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Bv. sendi pruv-ekzempleron. Estas bibliografiataj ĉefe viditaj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro. Kunlaborantaj el monde ĉiuregionaj bonvenas.
